

**1921-07-08-sergeant-fousek\_1**

Kara samideano.

Mi permesas al mi kunsendi ĉapeton („un petit bonnet“) al via edzino. Kvankam mi ne konas ŝin, kvankam mi ne korespondas kun ŝi, mi pensas ke ŝi ne trovos tion stranga. Diru al ŝi kiom mi esperas ke tio okazos bonmaniere & ke ŝi & vi estos feliĉaj poste. Se la punto de tiu „petit bonnet“ estas iomete flava estas nur ĉar la punto mem estas iom antikva.

Mi ricevis hodiaŭ la du foliojn kiujn mi devas plenigi & resendi al la Konsulejo Tĉecoslovaque en Parizo. Do, vi vidos la formalaĵoj jam komencis. Ni preskaŭ decidis iri via Mainz a/Rhein. Ni forveturos sendube mardon aŭ merkredon de Kalaiso ĝis Mainz kie ni kusiĝos & iros jaŭdon ĝis Praha (se oni povas fervoje sen ŝanĝi iri) & alvenos en vian karan kapitalon eble vendredon aŭ sabaton la 30-a de julio.

Mi mendis loĝejon en privata familio sed ne scias ĉu oni sendos la adreson tien aŭ se ni nur konos ĝin irante al la akceptejo en

**1921-07-08-sergeant-fousek\_2**

en Praha. Estas terure maloportune kiam oni tute ne konas la lingvon ĉu „ĉeĥan“ ĉu „germanan“ sed tamen estas pli interese.

Mi nun skribos al delegito en Mainz por havi sciigojn & al malnova konatulo nia s-ro Istel en Wiesbaden, kiu ankaŭ iros al Kongreso!

Mi ricevis longan malgajan leteron de d-ro Rosenstock el Krakov, organizinto de tiu fama Kongreso. Kiel li suferis dum la milito, kiel estas terure esti Pola!!! Li ne povos iri Prahon pri la monŝanĝo.

Diru al mi kiel estas skribata en la stacidomo en Praha „boutique des Bagages“ , ĉar se ni devos iri rekte al Akceptejo por havi sciigojn, ni devos lasi niajn pakaĵojn en „**la Cou...???**“ (**Consigne?**)

Nun mi adiaŭos vin sed por longatempe. Mi sendube bezonos tagon da ripozo en Praha antaŭ la Kongreso tiel mi estos laca. Mi ne fartas tre bone nuntempe & ne povas skuiĝi (forpeli) la konsekvencoj de nia granda malvarmumo. Mi esperas ke vi ambaŭ fartas tute bone & ĝoje

Ĉiam sincere Alice Sergeant